FENIKSO NIGRA
ANARKIO.NET

# ANARKIO

INFORMA MONATA BULTENO
NOVEMBRO 2011
Nº 15




## 10ª Anarkiistaj Esprimoj - 2011 kaj 15-Oktobra Kamparo

Oni realigis kun tuta sukceso nia deka Anarkiistaj Esprimoj en San-Paŭlo urbo, kie ni havis la oportuneco de paroli sur esperanton, linukson, gentan aferon, anarkiistan rajton kaj aliaj anarkiistajn temojn. Ankaŭ ni parolis sur okupaplaca movado kie oni proponas liberacanaj agoj kaj la celo de kapitalismo. En tuta mondo estas okazas tio movado en la placoj kaj ĉi tie ankaŭ, en Campinaso urbo, oni okazas en Katedrala Placo. Pluraj kampantaj uloj estas "Anonimuloj", unu nova maniero agi kie la personoj ne bezonas de Ŝtato, de estroj kaj nek partioj, tio tre proksime anarkiista penso kaj multaj de ni estas unuiĝinta kun tio anonima idealo.

Ni vidu vin en luktaj stratoj per libereco kaj justeco!!! Anarkio nun!

## La Laborista Oktobro (Arĉinof, Petro)




La Revolucio de Februaro trafis la diversajn revoluciajn partiojn je plena konfuziĝo, kaj sendube ili estis plensurprizataj de la profunda socia karaktero de la naskiĝanta revolucio.

Unue neniu volis kredi tion krom la anarĥiistoj. La Bolŝevista Partio, kiu vantis esprimi la plej radikalan aspiron de la laborista klaso, ne taŭgis preterpasi ĉe siaj celoj la limojn de burĝa revolucio. Ĝis la aprila konferenco ili ne sin demandis, kio okazis reale en Rusio. Ĉu tio estis nur la faligo de la carismo aŭ estis transiranta revolucio –ĉu tiel malproksimen kiel al la neniigado de la kapitalismo? Tio starigis antaŭ la bolŝevistoj la demandon pri la sekvenda taktiko. Lenino ekkonsciis antaŭ ol aliaj bolŝevistoj pri la socia karaktero de la revolucio kaj emfazis la bezonon konkeri la povon. Li vidis decidan antaŭeniron ĉe la laborista kaj kamparana movado, kiu estis subfosanta pli kaj pli la bazojn de la industria kaj agra burĝaro.

Unuvoĉan kunsenton pri tiuj demandoj oni ne povis atingi eĉ dum la Oktobraj tagoj. La partio manovris senĉese inter la sociaj agvortoj de la amasoj kaj la koncepto pri socidemokrata revolucio. Sen kontraŭi la celon pri Konstitucia Asembleo de la eta kaj granda burĝaro, la partio faris sian plej bonan por kontroli la amasojn, klopodante elteni ilian paŝon, kio estis ĉiam pli malfacile por ĝi.

Dume la laboristoj marŝis impete antaŭen forfaligante senkompate siajn malamikojn ĉu dektrajn aŭ dekstrajn. La grandaj bienuloj komencis evakui el la kamparo, fuĝante antaŭ la ribela kamparanaro kaj serĉante la protekton de siaj proprietoj kaj subuloj ĉe la urboj. Dume la kamparanaro faris rektan redisdonadon de la grundo kaj ne volis eĉ aŭdi pri paca kunestado kun la bienuloj. Ĉeurbe okazis subita ŝanĝo ĉe la rilatoj inter laboristoj kaj entreprenistoj. Danke al la streĉo de la kolektiva genio de la amasoj, la Laboristaj Komitatoj stariĝis en ĉiu industrio intervenante rekte la produktadon, malgraŭ la admonoj de la mastroj kaj cele al ilia flankenigo. Tiel ĉe pluraj lokoj de la lando la laboristoj atingis la kolektivigon de la industrio.

Samtempe sur la tuta revolucia Rusio etendiĝis reto de laboristaj kaj kamparanaj Sovetoj, kiuj ekfunkciis kiel memmastrumaj organoj. Ili disvolvis, daŭrigis kaj defendis la revolucion. La kapitalista ordo kaj administrado ankoraŭ ekzistis laŭnome ĉe la lando, tamen la ampleksa sistemode laborista ekonomia kaj socia memmastrumado kreiĝis en ĝi. Tiu reĝimo de sovetoj kaj fabrikaj komitatoj per la nura fakto de sia ekzisto minacis morte la ŝtatan sistemon. Estas klarigenda, ke la naskiĝo kaj disvolvo de la sovetoj kaj fabrikaj komitatoj havis nenion komunan kun aŭtoritatemaj principoj. Plenkontraŭe ili estis, je la prava senco de la vortoj, organoj pri socia kaj ekonomia

memmastrumado de la amasoj kaj neniel organoj de la ŝtata povo. Ili kontraŭstaris la ŝtatan maŝinaron, kiu serĉis direkti la amasojn, kaj pretigis findecidan batalon kontraŭ ĝi. "La uzino por la laboristo - la grundo por la kamparano" –tiuj ĉi estis la agvortoj, kun kiuj la revoluciaj amasoj de la urbo kaj la kamparo partoprenis la fiaskon de la ŝtata maŝinaro de la posedantaj klasoj, je la nomo de nova socia sistemo surbazita sur la fabrikaj komitatoj kaj sociaj kaj ekonomiaj sovetoj kiel bazaj kernoj. Tiuj ĉi postuloj trakuris la tutan laboristan Rusion kun grava influo sur la direkta agado kontraŭ la registara koalicio socialista-burĝara.

Kiel klarigite, la laboristoj kaj kamparanoj jam estis rekonstruantaj la insdustrian kaj agran sistemon de Rusio antaŭ ol Oktobro de la 1917a.

La priagra demando estis praktike solvita de la malriĉaj kamparanoj je dato tiel frua kiel junio-setembro de la 1917a. La urbaj laboristoj siaflanke ekfunkciigis memmastrumajn sociajn kaj ekonomiajn organojn, kiuj forprenis la organizajn funkciojn sur la produktado al la ŝtato kaj al la proprietuloj. La Laborista Oktobra Revolucio neniigis la lastan kaj plej gravan barilon por la revolucio, la ŝtatan povon de la posedantaj klasoj jam venkitan kaj malorganizitan. Tiu lasta evoluo malfermis ampleksan horizonton por la atingo de la Socia Revolucio, envojigante ĝin tra la kreiva vojo al la socialista rekonstruado de la socio, al kiu jam celis la laboristoj dum la antaŭaj monatoj. Tiu ĉi estas la laborista kaj kamparana Oktobro.

Ĝi signifis povoplenan klopodon de la ekspluatitaj permane laboristoj detrui ĝisfunde la bazojn de la kapitalista socio kaj konstrui laboristan socion surbazatan je la principoj de egaleco, sendependo kaj memmastrumado de la urba kaj agra proletaro. Tiu ĉi Oktobro ne atingis sian naturan plenumiĝon. Ĝi estis perforte inter-rompita de la Bolŝevista Oktobro, kiu iom post iom disvastigis sian diktatoradon tra la lando.

---

## el Petro: Kursa Lernolibro por Laboristoj (ĉapitro 29) Al la kongreso.

Kiam pluvis iun vesperon, Petro devis sin kaŝi en katolika monaĥejo; kun malplaĉo li observis la morojn kaj kutimojn de la monaĥoj, kiuj kantis sanktajn kantojn kaj murmuris preĝojn. Ili estas kulpaj pri la misedukado, pri la sistemo de stultigo reganta ankoraŭ hodiaŭ en la lernejoj de la kapitalistaj ŝtatoj, — li pensis ĉe si kaj nur pene retenis sian koleron. Tre baldaŭ li forlasis tiun lokon, kun la firma deziro nepre trovi ian ajn laboron, eĉ nur por mallonga tempo, ŝparonte la necesan monon, kiu ebligus al li elekti ie ajn laŭ sia plaĉo restadejon. Ĉiuloke li nun demandis pri laboro. En malgranda urbeto proksime de Ljono (france: Lyon) li renkontis grupon el fervojlaboristoj, kiuj faris konstru- kaj riparlaborojn ĉe la fervojo. Lia peto pri dungiĝo estis sukcesa, kaj ricevinte hakilon kaj fosilon li komencis laboregi. Sub sennuba ĉielo kaj varmegaj sunradioj li pasigis malfacilajn kaj penigajn labortagojn.

Li vivis en primitiva kabano, tute mallukse kaj simple; tamen li ĉiam konservis siajn interrilatojn kun la laboristaj esperantistoj en diversaj landoj. Regule li ja ricevis la semajnan gazeton SENNACIULO; li do restis informata pri la okazoj en la laboristaj kaj esperantistaj rondoj de la tuta mondo. Lia plej arda deziro, nome partopreni kongreson de SAT, estis plenumiĝonta en tiu ĉi jaro. Kvankam lia nuna loĝejo estis sufiĉe malproksima de la kongresurbo, li ne hezitis efektivigi sian planon. En la lasta semajno de julio li kalkulis siajn monerojn, prenis la valizon, aĉetis bileton kaj forveturis al la kongresurbo. Tie li renkontis multajn kamaradojn, kiujn li ĝis nun konis nur perletere. Lia koro tremis pro ĝojo kaj ĉiuj estis tre kontentaj, pro tio ke ili tiel facile povis interkompreniĝi per esperanto. Neniu pensis pri alies nacieco; oni kvazaŭ forgesis la gepatran lingvon kaj interamikiĝis kiel en familia rondo. La seriozaj problemoj solvendaj de la kongreso kaŭzis ne malgrandan diskutadon kaj eĉ disputadon. Sed, kiel ĝiaj antaŭuloj, ankaŭ tiu ĉi kongreso signifis nekontraŭdireblan progreson sur la evolua vojo de la SAT-organizo.

---



## Ni bezonas voluntulojn!

Nia iniciatemo bezonas voluntulojn por skribi, traduki, desegni aŭ por iu ajn kontribuaĵo.
Ĉia helpo estas bonvenan, dankon!
Sanon kaj anarkion!


**Kontaktojn**
Fenikso Nigra
CP: 999 - CEP 13001-970 Campinaso - San-Paŭlio
Aŭ
CP: 5005 - 130036-970 Campinaso - San-Paŭlio
m.e.: fenikso@anarkio.net m.e.: fenikso@riseup.net
http://anarkio.net